# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



nº 7.-Julio-Aúgusto-Septbro 1990.

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Sidejo: Strato Sol, 75. E-41003 SEVILLA.-Hispanio.

Prezidanto: Manuel López Hernández
Sekretario: Francisco A. Antúnez Romero
Kasisto: Alberto Franco Ramírez

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella
Av.Compromiso de Caspe, 27/29.- 9º. C.
50002-ZARAGOZA. (Hispanio).
***
Miguel Fernández Martín
C/Santa Genoveva, 58.-6º.C.
28017-MADRID. (Hispanio).

Kovrilo: Don Manuel Azaña.(Legu pĝ. 8/9.)

Enhavo:


| | | |
|---|---|---|
| Impresoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 3/4 | Pĝ. |
| La ĝenerala Asembleo de HALE . . . . . . . . . . . . . . | 5/6/7 | " |
| Preskaú nekonata intelektulo . . . . . . . . . . . . . . | 8/9 | " |
| Bonvolu ridi...sed ne trol. . . . . . . . . . . . . . . | 10/11 | " |
| La signifo kaj historio de"riposti". . . . . . . . . . . | 12/13 | " |
| Administra angulo . . . . . . . . . . . . . . . . . | 14 | " |
| La Movado en kaj ekster Iberio . . . . . . . . . . . . . | 15 | " |
| Scienco, feliĉo, futuro . . . . . . . . . . . . . . . . | 16/17/18 | " |
| "Floro".-Giso", Lorca . . . . . . . . . . . . . . . . . | 19 | " |
| El aktuala liriko:"Unika Amo" . . . . . . . . . . . . . | 20 | " |
| "La krio", Lorca . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 21 | " |
| Hispana-araba Poezio . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 22/23 | " |


NOTO:Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aútoroj mem.

# Impresoj.

*Blanko. Kupoloj blankaj disŝiras la lazuron. Palmoj. Aromoj je daktiloj. Sirokecaj trablovoj kelkfoje faras peniga la spiradon. Oaza frisko, tamen, de tempeto al tempeto preskaŭ sekse karesas miajn sensojn. Blanko. Helo. Lumo. Blindigaj rebriloj el la kalkitaj fasadoj. Surstrande, kuŝe, nudmane, endimione belaj ĝermaneskaj blondulinoj, la haŭton salikoke ruĝa, horon post horo defias la misefikojn de la ozontavola truo. Afriko kaj Eŭropo kunaj: Almerio (Andaluzio). Mi feriadas.*



*Poste restas Sant Cugat, la HALE-renkontiĝo sub la libera ĉielo... Kiom da sensacoj! Ankoraŭ karuselas miakape nomoj kaj homoj, rememoroj girantaj ĉirkaŭ bedaŭro kaj espero, ĉirkaŭ ĝuo kaj ekzaltiĝo. Tielas nia Esperantujo.*

*Bedaŭro, eĉ ploremo -kaj eĉ indignoĉe la evidento, ke, dum la majoritato de la kongresanoj, respektindaj kaj fervoraj kamaradoj kaj amikoj, aspektigis olda nian kongreson en la okuloj de la ekstermovada mondo, nur dek kilometrojn for de la kongresejo, en la amata Sabadell, kelkaj junaj esperantistoj absolute fajfis pri ni. Ĉu eble por firme teni sin en la stulta, stretanima kaj provincaneska dikotomio hispanoj-katalunoj, pli propra al filistraj futbal-fanatikuloj, ol al veraj internaciistoj, mondcivitanoj kaj progresemaj homoj, el kiuj pluraj kuraĝas nomi sin, krom esperantistoj, anarĥiistoj? Kia paradokso! Dissaltis la muro de Berlino. Dissaltas ĉiutage multaj muroj. Sed forte staras ankoraŭ "muroj de miljaroj". Inter admirindaj kulturoj. Inter frataj gentoj cise-transe cerboŝtopitaj de la universala kasto de la vampiroj, etburĝoj kaj manipulantoj de la popolaj sentoj, en kiu ajn lingvo ili parolas. Jen la unusolaj malamikoj komunaj al ni ĉiuj.*

*La racio. Mi kunvokas ĉiujn ĉirkaŭ la racio. Nur ĝi faras nin nepre "kondamnitaj" al interkompreniĝo. Espero, ĉion spite, ĉar la nova HEF-estraro komencis*

geedzigi utopion kun realo, tiel brave kaj pasie, ke jam preskaŭ palpeblas la sukceso, eĉ se nur parta,de la ambicia strategio konceptita por la venontaj jaroj. Ĉar HALE kreskas poiome. Ĉar nia HALE-kunveno plej senĝene, nature, neformale kaj spontane disvolvita ĉe pepado kaj trilado de birdoj pruvis, ke, malgraŭ ĉio, seniluziiĝo ĉe ni ne havas lokon, ke ni, junuloj kaj veteranoj, vibras diversmaniere sed per la sama ondolongo, revas plue, ope, ade serĉas novajn vojojn ĉiam pli konformajn al la nunaj sociaj dinamiko kaj spertoj. Ĉar "Kajeroj" plaĉas al la legantoj. Ĉar la vorto futuro skribiĝas per vivamo...

Ĝuo ĉe la konstato, ke grava nombro da samideanoj esprimis sian deziron kongresi nur por labori per kaj por E-o, per kaj por la E-a kulturo. Kiam en la historio de la HEF-kongresoj vidiĝis tiom da HEF-anoj kolektiĝintaj ĝis la dua kaj duono frumatene por debati pri faka temo: "Projekto pri formaligo de la E-a konjugacio"?

Ekzaltiĝo ĉe mia prelego pri Federico Garcia Lorca. Kiom da vibroj! Mi alportis nur la koron. La interfluon de emocioj inter mi kaj la ĉeestantaro, la magion, kreis nur la poezio mem. Kiu diris, ke la ĝenerala publiko ne kapablas aliri al la muzoj, al la altaj animstatoj kaj pensoj? Koro kaj vero. Pure-nure. La karmemora socialisto profesoro Tierno Galván parolis tiel profesorece en la katedro kiel en la plej popularaj kvartaloj de Madrido. Kaj la simplaj homoj rite aŭskultis lin, sentis lian veron en la koro. Lorca asertis, ke por kompreni "La vivo estas sonĝo", de Calderón de la Barca, "ĉiuj lumoj de la teologio necesas, sed por senti ĝin, la teatro samas tiel por moŝteca sinjorino, kiel por servistino". Trafe. Oni sobigu do la parnason al la komunaj civitanoj pere de la koro, kaj oni kolektive spertos la envulto-povon de la poezio. La poezio elŝprucigas belon kaj veron. La belo kaj vero apartenas al ni ĉiuj. La poezio nias.

De ĉe mia teraso videblas la velŝipoj en lontano, la graciaj kurbiĝoj de la marbordo, puntitaj de hulŝaŭmo, la Edeno. Ho ferio! Baldaŭ ree mi enpaŝos en la grandurban frenezecon, en la ĉiutagan lukton kontraŭ... Sed, zorgojn for! Nun mi volas forspongi ajnan spuron de tedo. Nun mi feliĉas. Fina punkto.

Miguel Fernández

# La Ĝenerala Asembleo de HALE




Ne multnombra sed tamen sufiĉe kontentiga estis la partopreno de membroj en la Ĝenerala Asembleo de HALE okazinta ĉi-jare en la Centro Borja de Sant Cugat del Vallés (Barcelono) kadre de la Jubilea HEF-kongreso, de la 11ª ĝis la 16ª de Julio 1990.

Unue oni legis la akton de la antaŭa ordinara Kunsido okazinta en Bilbao pasint-jare, kaj ĝi unuanime estis aprobita. Saman aprobon atingis la jara financa raporto kaj detala bilanco 1989/90. Pri ĝi oni povas nur komenti, ke dank'al la malavara sindonemo de kelkaj el niaj membroj kaj ankaŭ al niaj abonantoj ni ne nur evitis la deficiton, sed ebligis la trimonatecon de nia bulteno.

La Prezidanto, M.López Hernández, informis al la ĉeestantoj pri la aktivado de la Asocio,kies plej granda malfacilo troviĝas en la malalta nombro da membroj kaj ilia disiĝo sur la hispana teritorio, kio fakte devigas nin al individua agado kaj konstante serĉi la apogon de esperantistoj ne-membroj por pli ambiciaj planoj, kaj tial ne havi la okazon malvolvi specifan propran programon. Ne tiel okazas pri la redaktado de nia organo "Kajeroj el la Sudo" ĉar niaj k-doj A.Marco Botella kaj M.Fernández Martín atingis formi perfektan tandemon, kaj ambaŭ kune, sen grandaj ekonomiaj rimedoj kaj bombastaj elmontroj, redaktas modestan revuon sed tiel riĉenhavan, laŭdire de kompetentuloj, ke oni povas aserti sen erari,ke ĝi estas unu el la plej elstaraj inter la progresemaj bultenoj de Esperantio. Esprimoj en tiu senco tute ne mankas, precipe el eksterlando, kaj ĝuste en tiu punkto de la informado, la Prezidanto proponis gratuli ambaŭ redaktorojn pro tiu meritoplena tasko, kaj samtempe danke respondi al identaj gratuloj ricevitaj de LEA-oj kaj elstaraj SAT-aktivuloj, same kiel al tiuj de la ĝenerala Esperanta Movado.

Rilate la jarkotizon, oni aprobis plialtigi la ĝisnunan minimumon de la SAT-membroj al 500 ptoj jare; por ne SAT-membroj: 600 ptoj; kaj por simplaj abonantoj: 800 ptoj, kiel ĝis nun. La redaktoroj, siaflanke, akiras la kompromison aperigi la bultenon trimonate kaj kun samaj paĝoj kiel ĝis nun. Oni konsentis esprimi al nia k-do Ramón Manau nian dankon pro la ne ĉiam agrabla tasko enspezi la jarkotizojn.

La Redakcio de "Kajeroj" konfirmas la sendon de nia bulte-

no, senpage, al la diversaj LEA-oj kaj al multenombraj esperantistaj asocioj de nepagipovaj landoj, inter ili tiuj de Orient-Eúropo kaj aliaj de Afriko kaj Sud-Ameriko, fakte la nombro da ekzempleroj senditaj al la k-doj kaj centroj en nia solidara agado, multe superas tiujn de niaj membroj kaj abonantoj kune. La partoprenantoj en tiu ĉi kunsido aprobas unuanime tiun solidaran sintenon, kaj bedaúras la "surdecon" al niaj alvokoj en tiu senco de kelkaj asocioj proksimaj al la nia, tute ne sentivaj al solidareco kaj al disvastigo de socipolitikaj ideoj kaj kulturo per Esperanto.

La Prezidanto ankaú informas pri la grava akcidento okazinta al nia k-do Tomas Caspe Cereijo, tiel grava, ke li tute ne plu kapablas malvolvi sian taskon kiel kasisto de HALE. La kunvenintoj bedaúras tiun malfeliĉaĵon kaj petas al la Prezidanto esprimi al nia k-do Caspe Cereijo niajn plej bonajn dezirojn pri resaniĝo. Tiun laboron plenumos de nun k-do Alberto Franco Ramirez, ankaú membro de nia Asocio en Seviljo.

Tiu ĉi lasta ŝanĝo en la gvida aparato de HALE, estas la nura aprobita de la Asembleo, ĉar unuanime oni decidis konfirmi en siaj respektivaj postenoj ĉiujn komitatanojn kaj ambaú redaktorojn.

Skize, tiuj estis la precipaj temoj pritraktitaj en nia jara kunsido, ĉi-okaze en la Centro Borja de Sant Cugat, sufiĉe sobra je konkludoj por indukti nin al optimismo, sed ankaú ne tiel negativa ke ĝi baru niajn esperojn pri estonteco pli promesplena. Aldone al tiu ĉi Raporto, ni devas ankaú informi pri la prelego de nia kunredaktoro Miguel Fernández Martín en la kadro de la Jubilea HEF-kongreso kaj de la ĉi jara HALE-renkontiĝo.

La prelego konsistis en profunda studo pri la plej gravaj viveroj kaj la signifo de la verkado de Federico Garcia Lorca, disertacio dividita je du partoj: unu horo matene kaj sama tempo posttagmeze. K-do Fernández, tradukinto de teatraĵoj kaj multenombraj versaĵoj de Lorca, faris memorindan prelegon, unikan ĝis nun en nia Movado: li kantis, kiel granda artisto povas tion fari, t.e. kun emocio kaj arto, kanzonojn pri "kanto-ĥondo"(1) tiel, kiel konceptis ĝin Lorca... Filo de granadano, kaj kiel Lorca granadano ankaú li mem, nia k-do Fernández rekreis tiun andaluzian etoson tiel profunde amitan kaj poezie priskribitan de la mita poeto, kaj mirinde fidele revivigis la sorĉajn spektaklojn de la ciganaj kanzonoj kantataj en Albajcin; kaj elvokis tiun specialan lunon andaluzan profilantan la arabajn murojn de Alhambro...

Poste, li majstre priskribis per dokta parolo, la amikajn rilatojn de la poeto kun lia profesoro, la eminenta Fernando de los Rios,

kaj ankaŭ kun Manuel de Falla, lia profesoro pri muziko, kaj kun tiu plejado de homoj neripeteblaj kunloĝantaj en la Restadejo de Studentoj en Madrido: Dali, Buñuel, Prados, Moreno Villa, k.a. Tuj poste, nia k-do analizis kun granda sentiveco la teatron de Lorca, (ne vane li jam tradukis al Esperanto "Sanga Nupto" kaj "La domo de Bernarda Alba") tiun teatron kiun la poeto konceptas kiel totalan spektaklon, ĉar en ĝi la teksto nur estas parto el la tuto, ĉar ĝi konsistas el diversaj elementoj:muziko, mimado, plastiko, dancado. El tiu tuto ŝpruciganta vitalon, pasion,voluptón, poezion, naskiĝas la dramoj, kiuj neeviteble sorĉas la spektakton. Tiu nova stilo de teatro restis por ĉiam viva en la menso de universitatanoj kaj simplaj homoj de hispanaj urboj kaj vilaĝoj, kiujn li itinere kun teatra trupo trakuris prezentante ĝin kune kun la teatro de klasikuloj kiel tiu de Cervantes, Lope de Vega, Calderón k.a. Kun sama fervora sindediĉo li prezentis ankaŭ tiun teatron en Nov-Jorko, Buenos-Ajreso, Madrido kaj en multenombraj francaj urboj, havante kiel ĉefrolulinon la eminentan aktorinon Margarita Xirgu.

La tuta prelego de nia k-do Fernández estis dissemita per pecoj da poemoj el la plej brilaj de Lorca: "Funebra kanto por Ignacio Sánchez Mejias", "Kasido pri la branĉoj", "Soneto pri la obskura morto", "Floro","Ĝiso", k.a., ĉiuj ili aperos iom post iom ĉu en "Kajeroj", ĉu en "Boletin" de HEF, kaj ĉiuj ili estis deklamitaj tiel korsente kaj pasiplene, ke emociaj larmoj ŝprucis nebremseble el la okuloj de granda parto el tiu publiko, tute ravita kaj freneze aplaŭdanta pli ol per manoj per la propra koro...

Malfacile, iam, oni povis aŭdi en Esperantio tiel altnivelan kaj kompletan prelegon. Mi, almenaŭ, laŭlonge de duona jarcento neniam aŭdis ion similan!

Ni gratulas kaj dankas nian kamaradon por tiu memorinda prelego, kiun ni certe neniam forgesos!

La Redakcio.

*** ***

(1) kanto ĥondo: esprimo ekvivalenta al flamenko-kanto kaj nepre uzita por diferencigi en ĝi la artan kategorion de la plej bona: ordinare oni uzas la vorton por substreki la kanton plej profundan kaj melodian kaj speciale tiun, kiu plej korŝire esprimas la draman mesaĝon de la kanzono.

*** *** ***

*Esperantisto: Se vi deziras akiri esperantistan kulturon kaj historiajn sciojn, ne dubu tuj viziti la Hispanan Muzeon de Esperanto en Sant Pau d' Ordal (Barcelono).*

# Don Manuel Azaña

*Antaŭ duonjarcento, guste en 1940, forpasis en Montauban (Francio), ekzilita, eminenta homo preskaŭ nekonata kiel intelektulo, kaj tamen rimarkinda en sia epoko inter la plej elstaraj. Ni parolas pri Don Manuel Azaña y Diaz: advokato, politikisto, verkisto, lasta Prezidento de la 2ª hispana respubliko ĝis la fino de la intercivitana milito, kaj resume, unu el la plej eminentaj intelektuloj dum la lasta jarcento, preskaŭ tute forgesita nun.*



*Kiel politikisto li apartenis al la revolucia komitato aktivinta kontraŭ la monarkio en 1930, kaj partoprenis en la provizora registaro kiel ministro de tiu unua administracio de la 2ª hispana respubliko (1931). En la Parlamento li montriĝis kiel eksterordinara oratoro, tiel majstre, ke per simpla parolado li solvis la malfacilan problemon pri la loko okupenda de la Eklezio en la ŝtato, en tiu momento unu el la plej gravaj solvendaj. Kiel ideologo li elpensis la idearon per kiu li refondis sian partion kun maldekstraj elementoj el la radikalaj socialistoj, tial li ricevis la konstantajn kaj plej furiozajn atakojn de la dekstruloj, ĉar li per siaj moderaj kaj raciaj ideoj progresemaj fariĝis akso fundamenta ĉirkaŭ kiu formiĝis la popola fronto.*

*Lia unua verko, "La ĝardeno de la monaĥoj", novelo publikigita en 1922, jam rivelis lian kapablon kiel granda verkisto: en ĝi li rememoras sian adoleskan vivon kaj faras kritikajn studojn pri Juan de Valera per stilo fajne admirinda, kiu vekis la entuziasmon de la tiutempaj intelektuloj, eble neripeteblaj en nia historio en mallonga periodo: Ortega y Gasset, Marañón, Cossio, Valle-Inclán, Unamuno, fratoj Machado, Lorca, k.a.*

*La saman profundan impreson donis liaj prelegoj en Ateneoj kaj kulturaj Centroj, liaj politikaj paroladoj en la Parlamento kaj liaj publikaj mitingoj; pri ĉi tiuj lastaj Luis Araquistain diris, ke tiaj oratoraĵoj ne nur estis vera ĝuo por la spirito sed tute nova stilo por pritrakti la popolajn problemojn de la socio kaj kiel*

komprenigi la politikon, kaj simile sendube pensis tiu impona amaso da homoj, kiuj en oktobro 1935 plenigis en Madrido la kampon de Comillas: 40.000 side kaj 240.000 stare, kiuj entuziasme aplaŭdis la grandan oratoron... Neniam oni konis ion similan!

Pri tiuj publikaj paroladoj, Gregorio Marañón, kiel simpla leganto de liaj duvolumaj "Paroladoj" ne nur gratulis Don Manuel, sed publike deklaris "la grandan plezuron legi tiajn admirindajn artoverkojn, de komenco ĝis la fino".

Don Manuel Azaña lasis, krom siaj memoraĵoj,publikigitaj en Meksikio en kvar volumoj, gravan heredaĵon (ankoraŭ ne kolektitan) pri diversaj parceloj de la scio kaj beletro, de nekalkulebla valoro: privatajn tagnotojn pri ĉiuj temoj, verkojn pri beletra kritiko, artikolojn, librojn kaj politikajn diskursojn, multenombrajn notojn kun interpretoj tute originalaj pri historio, artoj, pejzaĝoj, psikologio pri la hispana gento, ktp.; kaj kun tio tre vastan korespondadon kun talentaj homoj de ĉiuj sociaj tavoloj kaj pri ĉiuj temoj. Tiu abunda materialo bezonas la atenton de kapablaj kompetentuloj, kiuj kolektu, reordigu kaj pretigu en pluraj volumoj tiom riĉan heredaĵon.


Tiu ĉi eminenta intelektulo estis ankaŭ direktoro de la revuoj "España" (1922), kaj "La Plumo" (1920-1924), kaj publikigis, krom la indikita novelo, kritikajn studojn pri Valera ("Vivo de Juan de Valera. Valera en Italio. Amoj, politiko kaj Literaturo" -1929-). Li estas ankaŭ aŭtoro de tre interesaj eseoj kolektitaj en la libroj "Plumoj kaj Paroloj" (1930), kaj "La elpenso pri Don Kiĥoto, kaj aliaj eseoj" (1934).

Certe, la dekstruloj, neniam pardonis al tiu eminenta intelektulo lian politikon, unue, kiel fundamentan homon ĉirkaŭ kiu formiĝis la popola fronto; due, ĉar kiel ministro pri Defendo de la 2ª respubliko li reduktis la nombron de novaj oficiroj, kaj precipe, kontrolis la fidelecon al la reĝimo de la altrangaj militistoj.

Kun fervoro ni rememoras nun, okaze de lia forpaso antaŭ 50 jaroj, la figuron eminentan de Don Manuel Azaña, la figuron de tiu preskaŭ nekonata hispana intelektulo.

A.M.B.

BONVOLU RIDI...SED NE TRO!



Inteligenta infano.-

Dum vizito inter amikoj, la patrino de Petro invitas lin ĝentile kisi belan sinjorinon, sed la infano protestas: -ne, mi ne volas kisi ŝin!-
Kajole, la patrino petas de li klarigon pri sia sinteno, kaj la infano prave eksplikas: -mi ne volas kisi ŝin,ĉar mi ne volas ricevi teruran vangofrapon, same kiel ŝi faris al paĉjo en nia antaŭa vizito, kiam li kisis ŝin-.

Oni ne bone scias, kial la patrino de Petro tiel aĉe akceptis la logikan eksplikon de la infano.

*** *** ***

Logiko inter frenezuloj.-

Promenante sur strando du frenezuloj konversacias kaj unu el ili ĵetas sian horloĝon al la maro. La alia tuj lin demandas: -kial vi ĵetas la horloĝon al la maro?-
-Ĉar mi deziras konstati, ĉu ĝi scipovas naĝi- respondas la unua.
-Sed ĉu vi pretigis ĝian funkciigilon?- indikas la alia.
-Ho, tute ne!-
-Nu, kiel vi volas, ke ĝi naĝu, se vi ne tion faris?-.

*** *** ***

Deduktema infano.-

David rigardas sian patron palpadi bovinon, do scivoleme demandas lin: -kion vi faras paĉjo?-
-Mi esploras la staton de la karno de la bovino, ĉar mi volas aĉeti ĝin por komerca celo-.
-Nu, jam mi komprenas, diras la infano, verŝajne la poŝtisto ankaŭ volis hieraŭ aĉeti nian najbarinon Maria!-.

*** *** ***

Prudenta maljunulino.-

Unuafoje maljunulino veturas aŭtomobile kaj atente observas, kiel la stiristo, de tempo al tempo, elŝovas sian brakon tra la fenestro eksteren. Ŝi konsideras tiun agon malutila kaj danĝera, kaj tial ŝi diras al li: -bonvolu, sinjoro, ne lasi la direktilon kaj prefere prizorgu nur la kondukadon, restu trankvila, ĉar mi mem indikos al vi, kiam pluvos-

## Pri masonistoj.-

Masonisto mortis pro laborakcidento. En la tombejo, dum la enterigo viro ploras senkonsole. Alia akompananto demandas lin: -Ĉu vi estas proksima parenco aŭ amiko de la forpasinto?-
-Ho, sinjoro, mi nur estis lia kunlaboranto, sed mi ricevis liajn lastajn vortojn?-
-Kiuj estis tiuj lastaj vortoj?-
-Ho sinjoro, li diris al mi:"atentu kolego, ne tiel forte movu la skafaldon"-

*** *** ***

## Babilema homo.-

-Mi gratulas vin, mia kara, ĉi-foje vi parolis telefone nur dek minutojn!- Kun kiu vi parolis? -diras la paciencema edz(in)o.
-Ho, ne gravas, iu maltrafis la numeron- respondas la babilemul(in)o.

*** *** ***

## Alia pri masonistoj.-

Du masonistoj rigardas ĉiutage ekde sufiĉe alta skafaldo virinon promenantan kun stulta vanteco kaj ofenda lukso kaj kunportantan kaprican hundeton. Unu el ili, tro kolera pro la ofteco de tiom da vantaj elmontroj perdas sian prudenton kaj sovaĝe ĵetas brikon sur la hundeton, kiu mortas terure platigita. Kolera, la virino denuncas la masoniston, kiu devas tuj sin prezenti en la Policejon.

La policestro demandas la masoniston, kial li mortigis la hundeton. Sen plu pensi la masonisto respondis:
-Kion vi volus, ke mi faru? Ĉu eble lasi ĝin mordi min?-

*** *** ***

## Komprenebla ĝojo.-

Iu venas el la dentisto kaj ŝajnas feliĉega. Konato lin renkontas: -Pri kio vi tiom ĝojas?-
-Mi venas el la dentisto!-
-Ĉu tio estas kaŭzo por tiom ĝoji?-
-Ho, jes, li ne troviĝis hejme!-

***

Kolektis: Maria Fernanda

# La signifo kaj historio de "riposti"

## Enkonduko: La preseja koboldo ne ĉiam kulpas.

Tuj kiam alvenas aútorekzemplero de periodaĵo, en kiu aperas unu el miaj artikoloj, mi kontrollegas ĝin por ekscii, ĉu ĝi estis bone kompostita. Ne estas sekreto en Esperantujo, ke mia plej senkompata malamiko estas la preseja koboldo, kiu senĉese makulas miajn verkojn per misoj kaj mankoj. Ĉar mi bone konas miajn proprajn skribaĵojn, estas facile por mi, legante la publikigitan version, kapti la modifojn en la teksto. Ĝuste tio okazis lastatempe en tri artikoloj.

En "Normoj de redakcia politiko kaj etiko" ("Boletin" de la Federación Española de Esperanto, nº 295, marto-aprilo 1990, pĝ. 16-18) mi haltis ĉe la unua frazo de la dua alineo sur pĝ. 17: "Ekzistas tri eblaj procedoj, kiujn redakcio povas sekvi por prepari por publikigo". Estas evidente, ke tiu frazo lamas, ĉar mankas la substantiva objekto post la verbo "prepari". Kontrolante en la karbonkopio de la tajposkripto, mi konfirmis, ke mi tajpis la vorton "manuskripton". La elfalo de tiu vorto estas la rezulto de tipa petolaĵo de la preseja koboldo. Kelkfoje, kiam li estas ege malica, li forŝtelas tutajn tutajn frazojn, eĉ alineojn!



Mia artikolo "Kial malsukcesis la revuo Historiaj Studoj" ("Boletin"de la Federación Española de Esperanto, nº 294,januaro-februaro 1990, pĝ. 13-15) aperis kun jena frazo ĉe la komenco de la lasta alineo sur pĝ. 14: "Tiu fiaskinta provo lanĉi HS havas instruivan gravecon por ĉiuj aliaj entuziasmuloj, amantaj fondi novan periodaĵon en Esperantujo". Mi tuj substrekis la vorton "amantaj", ĉar mi bone memoris, ke mi skribis en la originala versio "emantaj" (de la verbo "emi"), kiu havas la sencon "inklinaj al". Tiutempe mi ne povis esti certa pri la kulpulo; ĉu ankoraúfoje temis pri la ĉiam aktiva koboldo aú ĉu ĉi-foje redakcia mano intervenis.

Pri la tria okazo ne estas ombro da dubo. En "Eternaj pretekstantoj"

("Kajeroj el la Sudo" nº 6,aprilo-majo-junio 1990, pĝ.16-18) oni povas legi jenan frazon komence de la dua linio sur pĝ. 17: "Lapenna kategorie rifuzis tiun pretekston, riportante, ke li akiris renomon en sia kariero kiel universitata profesoro samtempe, kiam li okupis altrangajn oficojn en esperantistaj organizaĵoj". Verkante tiun frazon, mi uzis la vorton "ripostante", sed la redaktoro de "Kajeroj" perletere informis min, ke li, ne konante la verbon "riposti", konjektis, ke ĝi estas eraro en la tajposkripto, do li anstataŭigis "ripostante" per "riportante". Kvankam tiu ŝanĝo lasas la frazon senchava, ĝi tute ne redonas la acerban guston de la reago de Lapenna.

Difino de "riposti": Mi proponas la sekvan difinon de "riposti" por la "Reviziita Plena Ilustrita Vortaro" (RPIV).
RIPOST/I (ntr.)
1. (skermo). Rapide kontraŭbati post parato de kontraŭa atako. Kontraŭriposto estas la ago de tiu, kiu paratis la riposton.
2. (f.) Tuj kaj vigle respondi al atako per atako, ofte en akra aŭ sprita maniero; rebate respondi; rebati al antaŭa rebato.

Nun relegu mian frazon cititan ĉi-supre, anstataŭigante la feblan "riportante" per "ripostante", kiu sentigas la akrecon de la langopinto de Lapenna.
Etimologio de "riposti"
La historio de ekvivalentoj de "riposti" en eŭropaj lingvoj estas sufiĉe longa. Etnolingvoj kaj ankaŭ Esperanto ricevis ĝin de la franca vorto riposte, kiun oni ekuzis la unuan fojon en 1527. Siavice, la franca lingvo prenis la vorton de la itala risposta "respondo" de la verbo rispondere. En la franca lingvo la verbo riposter akiris du signifojn: 1. vigle respondi, t.e. rebati; 2. skermorebati. La portugalaj riposta kaj ripostar same kiel la hungaraj riposzt kaj riposztozni havas la samajn signifojn.

Historio de "riposti" en Esperanto.
Por spuri la historion de vortoj en Esperanto estas necese uzi plurajn vortarojn. La reala vortprovizo de la lingvo ne troviĝas ene de la kovriloj de kvazaŭ-oficialaj vortaroj kiel "Plena Ilustrita Vortaro" sed estas dokumentebla en dise publikigitaj etnolingvaj Esperanto-vortaroj kaj ankaŭ en glosaroj. Efektive, ekzistas vortoj uzataj dum pluraj jardekoj fare de diversaj aŭtoroj, kiujn la konservativaj verdlingvaj vortaristoj ofte neracie rifuzas registri. Tri ekzemploj estas "holokaŭsto", "gejo" kaj "smogo". Ankaŭ la vorto "riposti" staris antaŭ la pordo de la kabinetoj de kelkaj leksikografoj dum pli ol kvaronjarcento! La sekvaj donitaĵoj demonstras, ke "riposti" estas vere malnova neologismo.
1955. Manke de pli fruaj ekzemploj de la uzo de "riposti", estas plej

probable, ke ĝi estis ekuzita de Reto Rossetti en la unua eldono de lia libro "El la maniko" ankaŭ 35 jaroj. Sekvas listigo de la vortaroj kaj glosaroj, kiuj registris ĝin.

1958. Esperanta-slovena kaj slovena-Esperanta vortaro de Otmar Avsec.
"Esperanta serbokroata vortaro" de Stevan Zivanović kaj Marinko Gjivoje.
"Esperanta-hungara vortaro"de Alfonso Pechan.

1963. "English-Esperanto Dictionary", tria eldono, de Fleming Fulcher kaj Bernard Long.
"Nova Esperanto-Japana vortaro" de Okamoto Joŝicugu.

1967. "Esperanto-English Dictionary" de Montagu C. Butler.
1968. "Parnasa Gvidlibro", dua eldono.
1970."Esperanta slovaka kaj slovaka-Esperanta vortaro" de Stefan R. Seemann.
1972. "La sporta lingvo" de Tibor Ujlaky-Nagy.
1982. "Japana Esperanto vortaro" de Miyamoto Masao.
1983. "Esperanto-korea vortaro" de Hajpin Li.
"Neologisma glosaro -eta postrikolto al PIV" de Henri Vatré.
1987."Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto-Suplemento-

Precize 32 jarojn post la ekuzo de "riposti" fare de Reto Rossetti, la redakcio de "Plena Ilustrita Vortaro" degnis registri ĝin. Bedaŭrinde, ĝi ricevis nur duondifinon, ĉar mankas la specifa signifo kiel fak-termino en la skermo. La reviziita difino, kiun mi prezentis ĉi-supre, ne preteratentas tiun gravan uzon de "riposti".

Bernard GOLDEN

---

ADMINISTRA ANGULO.-

Ni atentigas niajn legantojn pri la oportuneco pagi la abonkotizojn, ĉu la nunjaran aŭ la pasintjaran (tiuj kiuj ne pagis ĝin ankoraŭ).

Ni kvitancas jenajn pagojn:

| | | |
|---|---|---|
| De Enrique Piquero . . . . . . . . . . . . | 800,- | Ptoj |
| De Martin Aguado Jerez . . . . . . . . . | 1.000,- | " |
| De Maria Pi Mainar . . . . . . . . . . | 10.000,- | " |
| De Fr. Vicente Pérez . . . . . . . . . . | 1.000,- | " |
| De Joan Sutrias . . . . . . . . . . . . | 500,- | " |
| De Josep Mª Soler. . . . . . . . . . . . . | 500,- | " |
| Sumas . . . . . . . . . . | 13.800,- | " |



Sabadell.- La jurnalo "Diari de Sabadell" de la 19ª de Julio 1990, informas per tuta paĝo pri la HEF-kongreso okazinta en Sant Cugat del Vallés, substrekante la altan partoprenon de esperantistoj el la tuta Hispanio kaj tiu de delegitoj el dek unu landoj.

La jurnalo speciale elstarigas la viziton de la kongresanoj al la loka monumento omaĝe al D-ro Zamenhof, antaŭ kiu la Prezidanto de HEF ricevis de la aŭtoritatoj la"urbo-ŝildo"-n. La Prezidanto Alonso dankis por la honoro per emociaj paroloj.

*** *** ***


Togolando.- Eburborda Esperanto Asocio, Unuiĝo Togolanda por Esperanto kaj la Benina Esperanto-Asocio, kunlabore kun UEA, preparas la Unuan Afrikan Kongreson. Ĝi daŭros tri semajnojn, de la 17a de decembro ĝis la 7a de januaro. La kongresaranĝoj okazos en Lomeo, Kotonuo kaj Abiĝano. Oni anoncas tre allogajn prezojn, kiuj kun la dolĉa tropika klimato kaj precipe la stimulo, ke per tiu partopreno oni kontribuas apogi la Movadon en Afriko, espereble multaj esperantistoj decidos vojaĝi al Afriko. Informoj:Centra Oficejo de UEA, Nieu Binnenweg 176.-NL-3015. bj Rotterdam. Holando.

*** *** ***

Bondy.- Pro tro malfrua alveno de la koncerna raporto,ni ne povis siatempe amplekse informi al niaj legantoj pri la nunjara kongreso de SAT-Amikaro en Bondy (antaŭurbo de Parizo). Partoprenis ĝin 150 gekongresanoj el ok landoj. La urbestro de Bondy inaŭguris aleon "Esperanto" kaj tre favore impresis al la urbo Esperanto-Ekspozicion.

La 46a kongreso de SAT-Amikaro okazos en Amboise (Francio) en Pasko 1991 kaj oni celas pritrakti kiel ĉeftemon "la ekologion de la Loiro-regiono.

# Scienco, feliĉo, futuro



*Antaŭ kelkaj tagoj mi renkontis iaman lernanton de Esperanto-kurso, kiun mi gvidis en la jaroj kvindekaj, ankoraŭ dum la periodo de la diktaturo. Li, tiam, studis medicinon kaj kutime montriĝis idealisto, kontestemulo kaj nekonformisma. Kion mi laste sciis pri li oni povas skribi en apenaŭ du linioj: li fariĝis kuracisto, laboris kelke da jaroj en kamparanaj medioj, kuracante kaj solidare helpante mizerulojn, plurfoje li estis enkarcerigita pro politikaj motivoj, kaj fine, li mistere malaperis kaj nenion mi plu sciis pri li.*

*Post pli ol 30 jaroj, mi retrovas lin preskaŭ hazarde, jam maturan homon, montrantan aspekton de sia personeco tiel fascinajn kiel tiuj kiujn li posedis junaĝe antaŭ tiom da jaroj: saman fervoron por defendi la malriĉulojn, similan idealismon, allogan konvinkan vervon...*

*Li rakontas nun al mi, tute modeste, la odiseon de sia vivo post tiu tago, kiam li devis ekziliĝi al Nordameriko, kie li vendis ĵurnalojn, kuracis en mizeraj kvartaloj kaj en grandaj hospitaloj, kaj finfine okupis postenon en skipo da sciencistoj de fama Nordamerika Universitato. Nun, li estas unu el la plej elstaraj neŭrobiologoj en la mondo, kaj li revenis al nia lando por studi surloke gravan profesian inviton celantan la organizadon en iu hispana Universitato de Esplora Centro pri Neŭrobiologio, kiun li mem gvidos se li akceptas la proponon.*

*Mi konfesas mian absolutan nescion pri tiu moderna scienco, sed same sincere mi povas diri, kiom granda estas mia scivolemo pri ĉiu novaĵo aperanta antaŭ mia rigardo, kaj tial, ĉar pri la specifa laboro de mia amiko mi volus scii almenaŭ elementajn fundamentojn, mi montris al li mian intereson. Por komplezi min, li konsentis veni al mia hejmo, kaj inter taso kaj taso da kafo ni konversa-*

*ciis dum tuta posttagmezo pri la temo, kaj tiom multe ĝi plaĉis al mi, ke facile mi cedas al la tento transskribi kelkajn notojn sintezigante la plej interesajn asertojn eldiritajn de mia dokta amiko:*

*"La moderna neŭrobiologio -diris mia ekslernanto- estas scienco, kiu sin bazas sur la eksperimenta esplorado de la nervosistemo, celanta skizi eksperimentojn kaj interpreti fiziologie la konkludojn eltiritajn el ili". "Oni dubis ĝis antaŭ nelonge, pri la rilato inter certaj influhavaj cerboregionoj kaj la konduto aŭ reago laŭ difinita senco de la homo, ĉar oni opiniis, ke la bazaj karakterizoj de la nervoaktiveco kuŝis en la tuto kaj ne en certaj partoj de la cerbo, cetere, pro la fiziologia limigo de la sensoj, en ĝia interno nur cirkulas elektraj kaj ĥemiaj signoj. La moderna esploristo scias nun pri la ekzisto de alia elemento: la informadiko. Ĝis nun tiun mondon konstituis materio kaj energio, hodiaŭ ni povas ankaŭ aldoni la informadon. Urĝe oni bezonas, ke la ekstera realo transformiĝu en simbolojn por penetrigi ilin en la cerbon. Enmagazeniĝo de informado, interkomunikado kaj neŭrobiologio estas intime ligataj".*

*"En la aktuala momento ekzistas io, kio eskapas el la kompreno de la cerboesploristo, kaj tio estas la ĝusta signifo pri kio okazas en la interno de la cerbo, fakte la homo ne havas neŭronojn kaj inteligenton por kompreni tion, tute same kiel li (ŝi) ne povas kompreni la finan aŭ senfinan mondojn, kaj tamen oni bezonas solvojn eĉ provizorajn solvojn, kiuj ebligu ekkompreni nian sensorian malsufiĉecon... Kiel klarigon ni metu ekzemplon: ni ne povas kompreni la kosmajn radiojn, sed ni povas registri ilin per fizikaj instrumentoj kaj tiel vidi ilin, eĉ sen posedi proprajn naturajn sensilojn".*

*"La cirkulado de mesaĝoj kaj informaj kodoj tra la cerbo, la pozitiva rezulto de eksperimentoj faritaj en certaj cerboregionoj kaj la kunordigo de ĉi tiuj elementoj, inklinas nin pensi, ke oni povas lerni, kiel akiri pensoscion, kiel edukiĝi per la cerbo pri la enkonduko de la sentoj, kaj, sinteze, kiel formi mense la novan inteligentan homon kun la sufiĉa kapablo por atingi la*

*ĉiaman miton de la homo: la feliĉon".*

*Mia amiko kaj liaj kolegoj estas konvinkitaj, ke tiuj sistemoj havas siajn proprajn neŭronajn grupojn kaj jam esploris ties meĥanismojn pri la plezuro, agresemeco kaj diversaj emocioj de la homo per eksperimentoj faritaj ĉe simioj aŭ personoj...*

*"En miaj studoj -eksplikis mia amiko- ni induktis la sensacon pri feliĉo per elektraj stimuloj intracerbaj, kiujn ni starigis per interkomunikado de la cerbo kaj komputero, kiuj jam interŝanĝis kodojn kaj inteligentajn informojn. Tiuj eksperimentoj, per kiuj ni intencis koni kiel indukti stimulojn kaj ankaŭ kiel kontroli certajn optimismajn sensacojn, konstatis al ni, kiel esencaj estas la indikitaj cerboregionoj por tiuj funkcioj".*

*Skrupule, mia amiko eksplikis al mi la urĝon de nia socio trovi kontentigan solvon al la grava problemo de la homaro: la feliĉo. Kaj urĝas, ĉar ĝi ne plu estas spekulativa temo de elito da saĝuloj kiel tiuj filozofoj de la antikva Grekujo, aŭ la fervora konvinko de la religiaj mistikuloj de la Mezepoko, limiganta la feliĉon al la intima ĝuo pri dio, aŭ la teoria celo de distra rezonado de kleruloj en la brilaj salonoj de nobeluloj dum la Renesanco kaj pli modernaj epokoj... Ne, la feliĉo ne plu estas temo pli-malpli racia por la homo, sed bezono por la nuntempaj generacioj, kiuj avide serĉas la feliĉon kaj, ne trovante ĝin tuj, akceptas kiel pseŭdorimedon la sekson, kaj la drogojn. La eraro estas granda, ĉar la feliĉo estas mensa stato, la plej alta aspiro de la homo, dum la indikitaj plezuroj estas nur sporadaj ĝuoj de la sensoj, atingeblaj per stimuloj fizikaj aŭ ĥemiaj. Jen kial por atingi la feliĉon, oni devas esploradi kaj serĉi ĝin per aŭ tra la cerbo. La artifika kaj sporada "feliĉo" kreita per la drogoj nur kondukas la homon al propra detruo*

*La tasko ne estas facila, ĉar post la eltrovo de la ĝusta vojo oni devas komenci la etapon pure edukan, konsistantan en la formiĝo de generacioj, kiuj ekde la infaneco pretigos en siaj cerboj neŭronajn parcelojn por la magazenoj de la memoro, kreante ankaŭ referencajn sistemojn,kiuj ebligos la interŝanĝon de informado kun la mondo*

*reala kaj la interpretadon de ĉio, kio okazas en la interno de la cerbo. Eble, eduki, unue edukistojn kaj politikulojn, ne estus erara decido, kaj la instruado de homaramaj principoj pli kongruaj kun la universaleca vivo de nia nuntempo, farus la homon pli respondeca kaj konscia kun siaj solidaraj devoj.*

*La defio estas vere transcenda. Sendube en tiuj laboratorioj, kie mia amiko laboras, oni preparas la unuajn brikojn de nova stadio en la evoluo de la homa civilizacio.*

*Antonio Marco Botella*

---

Federiko Garcia Lorka

Trad. M. Fernández Martin

# "Floro"



La saliko superba
de la pluvo faladis.
Ho, la luno tutronda
super la blankaj branĉoj!

(El la kolekto "Kanzonoj").

# "Ĝiso"

Se mi mortos,
restu la balkon' aperta.

Infan' manĝadas oranĝojn.
(Lin de la balkon' mi spektas).

Falĉist' falĉadas tritikon.
(Lin de la balkon' mi sentas).

Se mi mortos,
restu la balkon' aperta.

(El la kolekto "Kanzonoj").

# El aktuala liriko: "Unika Amo"

Kaj
subite
en kalma nokto,
en senso-raba nokto
-amik', amanto de la akvo-
luma palpit' el mi ne scias kie
kaj via tikla humideco sur la poroj
metis la splenan kordon mia-brustan en vibradon.

Kaj
la kanto,
sirena kanto,
plur-voĉa lirlo-fugo,
irizis mian haút-konturon,
la krestojn de la montoj kaj la poplojn,
svenigis milde ajnan geston, ajnan spiron,
ajnan klopodon resti kontraú vi susur-imuna.

Vi,
ho akvo,
basena akvo!,
ĝokonde ridetadis:
subtile, svage, sparke, sfinkse,
kun perla koliero el la astroj,
en punta robo el Alhambraj arabeskoj,
kun frizoj el zefiro kaj parfumo el la mirtoj.

Vi,
ho akvo,
stompita virin-bildo,
ondanta revo fine fakta!,
min vokis al la plej perfekta amo,
al la plej dolĉa kuplo sube de la luno,
al la krozad' plej karna sur volupto-ŝip' sen rudro.

.-...

*** *** ***

Esperantisto: Se vi deziras akiri esperantistan kulturon kaj historiajn sciojn, ne dubu tuj viziti la Hispanan Muzeon de Esperanto en Sant Pau d' Ordal (Barcelono).

Mi,
ho akvo,
amata akvo!,
mergiĝis via-sinen,
frandis la kisojn de mil buŝoj,
en fluidaĵ' edena envolvita,
en vian centron glitis glate kaj tenere
la sekson delektita de l' karesoj pleje fluaj.

Mi,
ho akvo!,
vin kovris per viv-roso
inter flustrado kolombuma
laŭ la iro-reven' konstelacia,
kunligis milojn da jar-centoj kaj neebloj
en la eterna horo de la plej unika amo.

Miguel Fernández Martín

---



(El "Poemo pri Cante Jondo")

## LA KRIO. F.Garcia Lorca.

L' elipso de krio
iras monte-
al-monte.

Super l' olivarboj
ĝi estos ĉielarko
nigra sur blua nokto.

Aj!

Jen, kvazaú arĉo alda,
la krio igis vibri
longajn kordojn de l' vento

Aj!

(Loĝantoj en kavernoj
siajn kandelojn montras).

Aj!

Trad.M.Fernández Martin

ALMERIA.

Ankaŭ Almeria fariĝis tajfo-regno post la falo de la regado umaja de Kordovo. Ĝi estis elstara tajfo (1) pri la uzado de la poezio, same kiel la ceteraj andaluzaj regnoj.

Sajnis, ke la alveno en Al-Andalus de la almoravidoj (2) en la jaro 1090 estus la fino de tiu brila periodo, kiam la poetoj tiel multe svarmis en la almeria regno de Mutasim, sed tiu konjekto ne okazis: la almoravidoj, homoj malkleraj venintaj el la nordafrikaj dezertoj parolis la berberan lingvon, ne scipovis la araban, tial ili ne povis kompreni la recitadon de poemoj, kiam ili partoprenis en la poeziaj festoj de la andaluzaj kortegoj, tamen ili ne reagis kontraŭ tiuj festoj. Jen unu el la poemoj de tiu malhela periodo, kvankam la poemo brilas per si mem:

<u>Valo de Almeria.</u>

Mi ja vidu min neniam
-ĝi estu decido dia-
apartigita de vi!!
Je via ekvid' mi vibras,
kiel glav' hindia tremas,
ho, valo de Almeria!

Kaj vi, estimata mia,
ĉar vi kun mi partoprenas
la idilian plezuron
de tiu rigard' ravsensa,
ĝuu l'okazon magian
de tia feliĉ' edena!

Sed drinku, kolomb' nun kveras,
kaj ĝia kant' en mi sonas
pli milda, ĉarma kaj bela,
ol tiu de Mabed (3) dolĉa
aŭ de Algarid (3) tenera,
elvokindaj kaj allogaj.

Ĉu vi vidas la riveron
kortuŝita de murmuroj
dum l'arboj preĝas kanteton
per balanciĝa susuro?

La suno, per oraj heloj,
ĝojigas ĉion per lumoj!

Kantas gaje la rivero
kiel sorĉa dancistino,
kies florkolĉeno ŝatus
la plej revajn inkapricojn...
Kaj l'arbobranĉoj ludemaj
levas per siaj manikoj
de l' akvofluo serena
gutojn, kiuj post disiĝo
fariĝas perloj brilegaj
saltante al infinito...

Zefir' faltigas laú skvamoj
la suprajon de l' rivero
kiuj brilas kiel sabroj
per sunradiaj reflektoj,
kiel la arĝento-vazon
sorĉe strias luna helo.

Bela val' de Almeria!
vibranta pro emoci'
mi volus vidi min ĉiam
plenĝoje ĝuanta vin!

Ibn Safar al Marini (XII$^a$ jarcento)

Kiel ofte okazas, la konkerantoj estis konkeritaj de civilizacio pli brila kaj altnivela, en tiu ĉi kazo -la almoravidoj- de la kulturo kaj ĉarmo andaluzaj. La rafinitaj kutimoj de la hispana-arabaj kortegoj fascinis tiujn preskaú analfabetajn afrikanojn, kiuj restis en Al-Andalus ne pli ol duonon de jarcento.

Komentoj, trad. kaj versigo: A.Marco Botella

*** *** *** ***

(1) tajfo: el la araba taïfa=ribelanto, ribelteritorio.
(2) almoravido: dinastio apartenanta al berbera gento, antaúa al la tuarega, fondita de du fratoj, Yahya kaj Abu Bakr, en insuleto de rivero Senegal, kaj dumlonge loĝanta en nordafrikaj dezertoj. La tribo ekspansiis ne nur suden sed ankaú norden, konkeris Marokon kaj fondis la urbon Marrakech,kiun ili konsideris sia ĉefurbo.Kiam ili estis plej potencaj invadis Al-Andalus en 1.090.
(3) Mabed kaj Algarid estis famaj arabaj kantistoj,pioniroj de la kantado en Arabio.

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str, Av. Compromiso de Caspe, 26, 1º

50002 -Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal Z-2398-88

Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.